

EKO 2024

TRA LA
MONDO
IRAS FORTA
VOKO

Numero 2024:07, februaro 9. Pezo: Word 40, PDF 310 KB, Alkroĉaĵo: la demandilo: 82 KB. Sume 4320 KB

500

EKO atingas gravan jubileon!

La komunikoj ekis en aŭgusto 2013, kiam la nuna EKO-isto kreis la komunikojn por plenumi sian taskon en UEA – prizorgi la landajn asociojn de UEA. Tre baldaŭ aldoniĝis pliaj grupoj – la fakaj asocioj, la gazetaro kaj la grupoj de ILEI.

Jen resumo de la progreso de la komunikoj tra la lastaj dek jaroj:

Jaro	Nombro	Sume
2013	8	8
2014	53	61
2015	52	113
2016	39	152
2017	36	188
2018	25	213
2019	17	230
2020	60	290
2021	58	348
2022	72	420
2023	73	493
2024	+ 7	500

Rimarkeblas, ke la nombro de komunikoj kreskis forte en 2014, ekde tiam iom post iom falis ĝis 2019. Tiam, enkraŝis la koviĉa pandemio, tiel ke ni ĉiuj devis resti hejme. Ni en EKO antaŭkovide revis pri kvieta emeritiĝo; tamen subite la esperantistoj bezonis kontaktadon kiel anstataŭaĵon de kongresoj. EKO rapide reagis, kaj la nombro de komunikoj tre rapide kreskis. Tiu tendenco daŭris post la pandemio kaj atingis zeniton en 2023, kiam disiris 73 komunikoj – rekorda nombro por la dekjara historio de la komunikoj. La fina rezulto estas, ke la nuna komunikado venigis nin al la duonmila eldono. Ni proklamas nian jubileon kaj alkroĉas interaktivan enketilon pro la komunikoj. Klaku sur kesteto por diri “JES”. Respondu ĝis marto 10.

La Tago de la Gepatraj Lingvoj

Eble iom malfrue ni komencas nun produkti niajn materialojn por partopreni la festadon de la Tago de Gepatraj Lingvoj la 21-an de februaro. La festado konsistos el disvastigo al NE-esperantistoj de afiŝo kaj teksto. Tiun saman tekston la oficejo de UEA ĉe UN prezentos al UN. Krome ni registris nian kampanjon en la pli vastan *Advocacy Day* [Tago de Atentigo] de la Monda Koalicio por Lingvaj Rajtoj. Do, ankaŭ ili rigardas nin. Mi nun petas vian helpon por traduki al via lingvo la vortojn en la afiŝo kaj la tekston. Viajn tradukojn bonvolu sendi al mi aŭ al unesperante@gmail.com.

Bonvolu partoprenigi la esperantistojn, kiujn vi reprezentas en ĉi tiu komitato, al la kampanjo. La kolekto de tradukaĵoj aperis en pluraj lingvoj ĉe:

<https://esperantoporun.org/eo/tago-de-la-gepatra-lingvo-2024/>

Renato Corsetti

SMG: La japanaj agemuloj jam uzas la japanan version de la afiŝo en ne-esperantista rondo: Ili skribas: Ni uzis la afiŝon kaj la tekston en la jena festo komence de februaro. 国際協力のお祭り ワン・ワールド・フェスティバル ONE WORLD FESTIVAL, <https://onefes.net/>



UEA mesaĝas pri la Gepatra Lingvo

Dum la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, ni antaŭenigas la gravecon de lingva diverseco kaj multlingva edukado. Lingvaj rajtoj estas fundamento por justaj kaj daŭripovaj socioj, ĉar lingvoj estas ĉe la koro de niaj ĉiutaga vivo, identeco, kultura heredaĵo kaj komunuma unuiĝo. Lingvoj estas bazo por aliri ĉiujn aliajn homajn rajtojn. Protekto kaj antaŭenigo de lingvoj gravegas, ĉar estas pere de lingvoj ke oni transdonas mondrigardojn kaj konservas lokajn kaj tradiciajn sciojn kaj kulturojn. Bedaŭrinde, laŭ Unesko, 40 procentoj de la monda loĝantaro ne havas aliron al edukado en lingvo, kiun ili parolas aŭ komprenas.

Samtempe, pli kaj pli da lingvoj malaperas.

En niaj pli kaj pli plurecaj socioj, kaj antaŭ la ideo de tutmonda socio kiu inkluzivas la tutan homaron, la demando pri lingvoj fariĝas nepre prioritato. Fakte, lingvoj estas la absoluta fundamento de kompreniĝo kaj kunlaboro. Tiel, lingvaj rajtoj rilatas rekte al demokratio kaj vera komuna decidado pri komunaj problemoj.

Ni antaŭenigu la valorojn de multlingva mondo proponitajn de Unesko: instruadon en gepatraj lingvoj, multlingvan edukadon en ĉiuj niveloj, kaj interkulturan edukadon. Tiel, ni esperas, ke paco, evoluigo kaj homaj rajtoj fariĝos realaĵo por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.

Per lingvoj ni kundividas nian homecon. Ni uzu kaj antaŭenigu ĉiujn lingvojn, inkluzive la internacian lingvon Esperanto, por realigi tiujn principojn kaj valorojn. Por festi la solidarecon inter homoj de malsamaj devenoj, ni ankaŭ invitas homojn de bona volo al la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo, Tanzanio. Jen la afiŝo en la ŝuahila.



Fonto: Gazetara Komuniko de UEA.

Tradukoj de la komuniko: <https://esperantoporun.org/eo/tago-de-la-gepatra-lingvo-2024/>

La kongresa temo en Aruŝa trilingve

Post iom da korespondado kun estraranoj de UEA, ni decidis kiel traduki la temon de la Universala Kongreso en Aruŝo, nome:

Esperanto: Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo

Angla: Language, people and environment for a better world

Franca: La langue, l'homme et l'environnement pour un monde meilleur

Bonvolu uzi tiujn formojn en via eventuala informado pri la kongreso.

Alia, pli granda demando estas kiel plej bone utiligi la okazon de la Universala Kongreso por antaŭenigi tiun temon. Kion ni povas fari, distance kaj surloke, por informi la publikon pri la implicoj de tiu temo – do elsalti el nia Esperanto-kokono (en kiu ni foje emas unue proponi solvon kaj nur poste difini la problemon...!) por engaĝi la neesperantistan mondon? Kiel ni povas prezenti nin kiel kunlaborantojn kun la pli vasta, neesperantista mondo? La temo gravas kaj la kongreso gravas. Faru ĉion eblan por **ĉeesti la kongreson kaj kontribui al la programo.**

Humphrey Tonkin

Indikaro el Dakaro

En Senegalio, en 2023, esperanto-kursoj estis faritaj dumaniere, unue ĉeeste kaj poste per vatsapo. S-ro Kossi Woudji sendis lecionerojn ĉe la vatsapo-platfomo (teoria kurso), kaj s-ro Lafi Charles Diatta gvidis vatsapajn babiladojn (praktika kurso). Kvankam neniu senegalano partoprenis la UK-on, nek la kongreson de ILEI, ambaŭ en Italio, Senegalio ricevis de Julio (Brazilo), librojn donitajn de ties partoprenanto; senegalanoj dankas.

Plej notinda evento de la jaro 2024, cele al diskonigado de Esperanto en Senegalio, estis partopreno de Senegala Esperanto-Asocio en libroekspozicio okazinta de la 15-a ĝis la 18-a de novembro 2023 en la kultura centro Blaise Senghor de Dakaro. Deĵoris dum tiu kvartaga okazaĵo kvar membroj de la landa asocio (Thierno BA, Assane Faye, Kossi Woudji, Lafi Charles Diatta).

Rilate al tiu evento, la senegala movado ege dankas al s-ino Martina Sachs-Böckelmann (Germanio), s-ro Ivano Kossey (Germanio) kaj s-ro Aziz Diallo (senegalano vivanta en Usono) pro ilia pozitiva reago aŭ ilia subteno, dankas, ankaŭ al ĉiuj, kiuj estis elkore ligitaj kun senegalanoj.

Dum tiu evento estis disdonitaj tekstaj prezentaĵoj de Esperanto, al pli ol cent homoj. Sed ankaŭ kvina parola prezento al la publiko pri Esperanto estis farita de Lafi Charles Diatta. Ĉiutage, dum la ekspozicio, deĵorintoj diskutadis kun vizitantoj kaj prenis iliajn kontakt-informojn.

Lafi Charles DIATTA, Dakar, laficharlesd@gmail.com

Reago al la Komunikado de la UN-informilo

Ankaŭ mi ĝojas, ke prof. **Szerdahelyi** estas menciita en UN-informilo. Li meritas multe pli da atento ol ĝis nun li havis. Li estis multflanka (inter)lingvisto, pedagogo, leksikografo, kiu instalas interlingvistikon kaj esperantologion kiel universitatajn fakojn. Sed li vivis en la antaŭreta epoko, tiel esperantistoj ne tiom konas lin, kiel li meritis. Ankaŭ la lingvistaro ne konas lin, ja li verkis ĉefe en Esperanto kaj la hungara. Por festi lian 100-jaran jubileon estos memorkunsido en la universitato ELTE (kie funkciis la Esperanto-fako ekde 1966), verŝajne fine de septembro (enkonduke mi jam interkonsentis kun la nuna katedrestro). Tie mi planas prezenti la libron el liaj elektitaj (esperantlingvaj) artikoloj kiun mi nun redaktas.

Ankaŭ por la interlingvistika laborsesio de la Internacia Lingvista Kongreso (kiu okazos aŭguste en AMU, Poznano) mi proponis prezenti lian lokon en interlingvistiko (anglalingvaj prelegoj okazos tie). Okazos jubilea omaĝo al Szerdahelyi jam en majo dum la Danuba Esperanto-Rendevuo en Budapeŝto.

Ilona Koutny

Interlingvistoj daŭre subtenataj

Ipl kaj Ifl estas eldonitaj de [Esperantic Studies Foundation](#) (ESF) kunlabore kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ili

disponigas informojn kaj ĝisdatigojn pri planlingvoj, interlingvistiko kaj lingvoplanado, kun detaloj pri eventoj kaj novaj publikaĵoj, raportoj pri lastatempaj konferencoj, kaj aliaj utilaj informoj por universitatoj kaj ĉiu, kiu interesiĝas pri interlingvistiko kaj rilataj temoj.

Artikoloj en Ipl ĝenerale nun aperas pli frue en la blogo [ESF Connected](https://www.esfconnected.net). Ĉiu numero kolektas artikolojn kaj novaĵojn el la antaŭaj tri monatoj de tiu blogo.

Nun haveblas numero 126 de Ipl (Informilo por Interlingvistoj)
<https://interlingvistiko.net/wp-content/uploads/2024/01/Ipl126.pdf>

Antaŭaj numeroj: <https://interlingvistiko.net/informilo-por-interlingvistoj-arkivo/>

aŭ ipi@interlingvistiko.net

Aliro al amaso da teknikaj vortaroj



En EKO 6 ni raportis pri la teknikaj vortaroj akireblaj en Hungario. Ni erare donis ligilojn al tekstoj en la hungara. Jen pli konvena ligilo:

www.eventoj.hu/steb/vortaroj/

===== vortoj: 1150 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunado Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe:

ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN: Skribu al stefan.macgill@ce@gmail.com.